


# LA JUNA VIVO

DUSEMAJNA  
ORGANO



POR LA  
JUNULARO

Redakcio kaj Administrado:  
West-Graafthijk (N.H.)  
Nederlando.

Gironumero 209354 Nederlando.

Nederlando: jarabono f 0,75  
Unuobla ekz. f 0.03  
duobla ekz. f 0.06  
Aliaj landoj: jarabono f 1.00.  
(15 Belg. fr. 10 Fr. fr.)

## LA MIRAKLA RESANIĜO.

Riĉaj homoj suferas malgraŭ sia mono pro multaj malsanoj kaj zorgoj, pri kiuj la malriĉulo ne scias. Iliaj plenaj pladoj kaj glasoj, iliaj komfortaj seĝoj kaj molaj litoj estas eĉ pli danĝeraj ol bakterioj kaj malsato.

Iu riĉa Amsterdamano foje spertis tion treege.

La tutan antaŭtagmezon li mallaboris sur la kanapo kaj fumis cigarojn, se por tio li ne estis tro maldiligenta, aŭ li rigardis dormeme tra la fenestro. Li manĝis kaj trinkis ĝis la dekdia. Kaj post tio li trinkis kaj manĝis, jen varman, jen malvarman manĝaĵon, ĝis kiam li enlitiĝis.

Kaj kiam li kuŝis en la lito, li estis tiom laca, kvazaŭ li penportis ŝtonojn aŭ rondiris en la buteriga aparato.

Dum la dormado li maltrankvile ronkis, tiel ke la najbaroj kelkfoje plentime kuris eksteren por vidi, ĉu la vento tiel muĝas.

Tiel li iĝis dika kaj grasa kaj malgracia kiel hipopotamo. Lia sanstato malboniĝis. Li manĝis ankoraŭ dum la tuta tago, sed ne bongustis al li. Kaj ĉiam li dezirus kuŝi en la lito, kvankam li ne povis dormi dumnokte.

Al multaj doktoroj li iris. Li do glutis sitelojn da medikamentoj kaj kestojn da pulvoroj kaj piloloj. La homoj moke nomis lin la promenanta apoteko. Sed nenio helpis kaj finfine li turnis sin por helpo al multaj ĉarlatanoj, kiuj sukcesis iom malpezigi lian monujon, sed ne lian korpon.

Fine li aŭdis pri iu doktoro, kiu loĝis tre malproksime, sed estis tiel lerta, ke li vere por ĉio havis konsilon. Kaj tial nia riĉa

Amsterdamano decidis skribi al la miraklisto longan leteron, en kiu li precize nomis ĉiujn siajn malsanojn.

Fariĝis granda listo, ĉar fakte li havis 365 malsanojn, por ĉiu tago de la jaro alian. Sekve li laboris dum unu tuta semajno super tiu letero kaj pro tio li tiel malbone fartis, ke li dum ses tagoj ne forlasis sian liton. Kaj li komencis por konsoli sin la matenmanĝon per bifsteko kaj dika ovokuko.

La okan tagon venis el la fremda lando letero, en kiu la fama doktoro skribis al li:

Kara Sinjoro!

Via malsano estas tre danĝera. Subite vi povas morti. Sed se vi sekvos mian konsilon, mi garantias al vi, ke vi iĝos tiel sana kiel fiŝo en la akvo. Vi havas teruran beston en la korpo, tenion kun sep kapoj. Tiun beston mi mem devas forigi, neniuj aliaj homoj povas vin liberigi de ĝi.

Do, vi devas veni al mi. Sed tio povas nur piede, ĉar eĉ se vi venus per veturilo kun la plej bonaj risortoj, tiam la plej malgranda ekskuo povus ektimigi la monstron. Kaj ĝi subite tramordus al vi la inteston en sep lokoj samtempe. Ankaŭ vi ne multe manĝu, ĉar tiam la besto kreskus kaj prempatigus al vi la hepaton. Ankaŭ en tiu okazo vi mortus. Do atentu bone: matene du buterpanojn kun glaso da lakto, tagmeze terpomojn kun iom da legomo kaj unu kolbaseton kaj vespere ankaŭ du buterpanojn kun ovo. Jen mia konsilo. Kaj se vi ne sekvos ĝin, via vivo estos kiel sapveziko. Vi mem elektu do.

La konsilo estis preskaŭ same terura kiel la morto. Sed en malpli ol du monatoj li povas resaniĝi kaj ree eniri la Mielkukan landon.

Ĝemante kaj anhelante li ekiris. La unuan tagon li tiel rapidis, ke limako lin povis preterkuri. Grumblante li apogis sin sur dika bastono kaj la kruroj preskaŭ ne povis porti la grasan korpon. Neniun li resalutis, kaj vermeton, kiun li hazarde renkontis, li piede mortigis.

Sed jam la duan kaj trian tagon la birdetoj gaje kantis al li, la ruĝaj papavetoj ardis tiel varme en la grenkampo kaj ĉiuj homoj aspektis tiel afable.

Li sentis sin ankaŭ tiel gaja. Kaj ĉiu mateno ŝajnis pli bela kaj pli gaja. Pli facile kaj pli elaste li paŝis ol en la komenco.

Kion diros la doktoro, kiam li tute sana ĵvenas. Kaj tamen, li estas nun jam tute sana. Eĉ malgravan dentdolareton li ne povos montri al la miraklisto. Tiel li atingis la doktoron.

„Kiel vi fartas, amiko? Rakontu nun precize, kiu el la 365 malsanoj vin turmentas plej ege,” diris la doktoro.

„Mi hontas pro tio, sinjoro doktoro,” respondis la Amsterdama-  
no, „sed momente mi estas tiel sana, kiel mi nur povas deziri al vi.”

„Ĝuste, ĝuste,” respondis la instruita doktoro. Kaj tre grave li rigardis la pacienton en la okuloj, igis montri de li la langon, palpis lian pulson kaj frapis al li la stomakon.

„Ĉio indikas,” li daŭrigis, „ke vi perdis la sepkapan monstron. Sed mi rimarkas, ke vi ankoraŭ havas ovojn de ĝi. Tial vi sekvu ankoraŭ la saman dieton kaj kiam vi ree estos hejme, vi segu ĉiutage lignon dum kelkaj horoj. Alie preskaŭ certe el unu ovo venos nova tenio, kiu vin turmentos ankoraŭ pli terure ol la malnova.”

Mokete li ridetis. Sed la riĉa Amserdamano respondis: „Vi estas ruzulo. Nun mi tre bone komprenas vian intencon. Dume mi estas tre danka al vi.”

Nun li ne plu sopiris al sia porka vivo, ĉar pli multe plaĉis al li la ĉiutaga, saniga sinmovo kaj la sobra vivmaniero. Fidele li vivis laŭ la novaj kutimoj kaj li estis sana kiel fiŝo en la akvo. Pro dankemo li sendis ĉiun novjartagon ducent talerojn al la miraklodoktoro.

Nur antaŭ nelonge li mortis en la aĝo de 99 jaroj, 5 monatoj kaj 6 tagoj.

El la holanda: VANE.

---

### AFRIKAJ FORMIKOJ.

Oni povas vidi la **nigrajn** formikojn, marŝantaj vice, kiel la soldatoj; iliaj oficiroj formas je malgranda distanco avangardon, dum la armeo sekvas iliajn piedsignojn. La oficiroj havas longajn akrajn pikilojn kaj, kiam ili trafas neston de **blankaj formikoj**, ili pikas tiujn unu post la alia. Kaj poste ĵetas ilin flanken, por ke la armeo ilin kolektu. Tiel ĉiu revenas kun blanka formiko por sia vespermanĝo.

Se vi ĝenas ĉi tiujn nigrajn formikojn, ili kvazaŭ siblas, kaj se vi ĵetas akvon aŭ teron sur la vojton, ili ne surpaŝas la baron, sed ĉirkaŭiras ĝin, eĉ se longa tempo estas necesa; en ĉia okazo ili ne returniros.

Ankaŭ la ruĝa formiko estas militema, sed pli danĝera, ol la nigra. Ĉi lasta detruas nur la blankajn formikojn, sed la ruĝa rapide englutas ĉian mortan karnon. En niaj civilizataj landoj, kiam besto mortas, oni enterigas ĝin, sed en Afriko la ruĝaj formikoj rapidege faras ĉi tiun laboron, ..... restas nur la ostoj! Se vi troviĝas sur ilia vojo, ili grimpas sur vin kaj je ia signalo, kune mordas vin.

La blankaj formikoj manĝas la mortintajn arbojn, en la arbaro kaj velkintan herbon sur la ebenaĵoj. Estus negrave, se ili kontentiĝus nur per tio, sed ili ankaŭ detruas la domojn de la homoj, iliajn ŝuojn, vestokestojn, k.t.p. La blankaj formikoj ne povas elteni la tagan lumon; tial ili fosas longajn tunelojn, kiuj iras de ilia formikejo ĝis la mortinta arbo, kiun ili volas ataki. Tiel al ili estas facile vojaĝi tute sendanĝere, for de la birdoj, kiuj manĝas ilin, kaj for de la teruraj malamikoj: la nigraj formikoj.

Nanterre, Francujo

R. M.

---

## POR KOMENCANTOJ.

### Saĝa ansero.

En Anglujo, en Huddersfield, loĝis lakto-vendisto. Li posedis anseron, kiu tiel amis lin, ke ĝi ĉiam sekvis lin. Kiam li portis la lakton al siaj klientoj, la ansero iris kun li. Ĝi iris en ĉiun domon kaj atendis trankvile, ĝis la vendisto estis preta. Estis tamen unu domo, en kiun la ansero neniam iris: tio estis drinkejo. Kiam ĝi foje kun la laktovendisto estis tie, la gastoj donis bieron al ĝi. Evidente la ansero ne ŝatis la efikon de tiu trinkaĵo, ĉar post tiu momento ĝi nepre rifuzis eniri tiun domon. Ĝi ĉiam pacience staris ekstere, ĝis la vendisto revenis. Ĉi tiu besto do komprenis, ke la plej bona flanko de drinkejo estas ..... la eksterflanko.

C. v. T.

Amsterdam, Nederlando.

Kie loĝis la lakto-vendisto?  
Kion li posedis?  
Ĉu la ansero amis lin?  
Kiun sekvis la ansero?  
Kiam ĝi sekvis lin?  
En kiun domon la ansero ne iris?

Kion donis la gastoj al ĝi?  
Ĉu la besto ŝatis la efikon de biero?  
Ĉu ĝi iris multfoje en la drinkejon?  
Kie ĝi ŝatis resti?  
Kion komprenis la ansero?  
Ĉu la ansero estis saĝa?

VIRETO EN ARBARO.

VI - RE-TO EN AR. BARO SUR U - MU KRUR' LI  
 STARAS TU-TE MU-TE EN LANA-TUR? KI-U ESTAS  
 LA VIRET', KI-U STARAS SUR KRURET' EN LA BELA  
 VER - DA AR. BA. RET'?

Mantelo bela, ruĝa ornamas lin,  
 Ĉapeto bela, nigra amuzas nin.  
 Kiu estas la viret' kun la ruĝa mantelet'  
 En la bela, verda arbaret'?

Vireto en arbaro ni konas lin,  
 Rozbero la sovaĝa, ni amas vin!  
 Tiu estas la viret' kun la ruĝa mantelet'  
 En la bela, verda arbaret'.

trad. ERNA RIECKMANN-LINDHWAD.


Bruselo, Belgujo.

**KORESPOND-ADRESOJ:**

ĉiu vorto: 0.03 gld.

**NEDERLANDO:** 15-jara knabo deziras korespondi kun samjara knabo en eksterlando. Adreso: M. J. Stofberg, Frederiklaan 20, Rijswijk (Z.H.)

**SOVETIO:** Ekonom. geografisto, 29-jara, dez. kor. ĉt, kĉl, -L, Pl, pm, b il. Interŝ il. gaz., esperantajojn kaj fotojn. Nepre respondos. Propono al ĉiuj interŝ. almenaŭ unu Pl, pm, b fl aŭ ion similan. Adreso: Abramoviĉ, Jalta, Krimeo, Tub. Instituto.



### LA SEPA LECIONO.

- |            |                    |                  |
|------------|--------------------|------------------|
| 1. turo    | 11. kruro          | 19. rano         |
| 2. arbo    | 12. pup-veturilo   | 20a. ansero      |
| 3. muelejo | 13. infan-veturilo | 20. ansereto     |
| 4. suno    | 14. tenilo         | 21a. buŝo        |
| 5. radio   | 15. pinto          | 21. buŝeto       |
| 6. herbo   | 16. vojo           | 22. vent-flageto |
| 7. kapo    | 17a. birdo         | 23. saketo       |
| 8. kolo    | 17. birdeto        | 24. kvasto       |
| 9. kolumo  | 18a. rado          | 25. ŝtrumpeto    |
| 10. manumo | 18. radeto         | 26. lud-tingo    |

Tre malgranda infano estas infaneto.

Tre malgranda domo estas dometo.

Kio estas fileto, besteto, pupeto, pilketo, steleto, vireto?

## SOMERA TAGO.

La vetero estas bela kaj varma. La suno brilas. Multaj birdoj kaj birdetoj flugas en la aero. En la verda herbo kreskas multkoloraj floroj. Tie ankaŭ sidas kelkaj ranoj. Sed unu rano timas kaj saltas for al la freŝa akvo. Baldau ĝi naĝas en la long-foso ĉe la aliaj ranoj. Nun la raneto estas kontenta kaj vokas: kvak, kvak! Sur la vojo promenas ansero. Ĝi rigardas al la ansereto. Sed ankaŭ la ansereto timas kaj kuras for. Knabino kaj knabineto iras en la suna vetero. Ili loĝas en la sama domo kaj estas fratinoj. En la infanveturilo kuŝas la frateto. Lidormas. La knabinoj promesis al la patrino zorgi pri la frateto. La fratinoj estas ĝojaj. La okuloj de ambaŭ brilas pro plezuro. La suno ja estas bela, bona kaj varma.

- a. Kopiu la frazojn en vian kajeron.
- b. Traduku la frazojn en vian gepatran lingvon.

La koloro estas bela. La kolora floro. La floro estas kolora.  
 La suno estas bona. Suna vetero. La vetero estas suna.  
 La brilo de la okuloj. La brilaj okuloj. La okuloj estas brilaj.  
 La varmo de la suno. La varma suno. La suno estas varma.  
 La turo kaj la arboj estas altaj kaj pintaj. La pinto de la arbo.  
 La muroj de la turo estas dikaj. La ringo estas ronda. La ronda estas malgranda. Li estas bona amiko. En amika letero estas multaj kamaradaj vortoj.

**Kiu** staras antaŭ la klaso? La fraŭlino staras antaŭ la klaso.

**Kiu** estas en la ĉambro? La patrino estas en la ĉambro.

**Kiuj** iras sur la vojo? La fratinoj iras sur la vojo.

**Kiuj** estas en la klaso? La infanoj estas en la klaso.

- a. Traduku la frazojn en vian gepatran lingvon.
- b. Post kelkaj tagoj traduku la frazojn en Esperanton

Kio estas sur la kapo de la knabineto? Kio estas en la herbo?  
**Kiu** kuŝas en la infanveturilo? **Kio** kuŝas en la pupveturilo?  
 Kie estas la muelejo? Kie estas la vent-flago? Kie estas la manumoj kaj kolumoj? Kiu estas post la infanveturilo? Kiuj estas en la domo? Kiu laboras en fabriko? Kiuj estas en la ĉambro? Ĉu la birdoj promenas? Ĉu la ranoj flugas? Ĉu la vetero estas suna?

Respondu al la demandoj.

## KION LA GAZETOJ SKRIBIS PRI „LA JUNA VIVO”.

1. **Flandra Esperantisto No. 3** (Sept. '34): „La revuo ne nur estas interesa por infanoj, sed ankaŭ por novaj esperantistoj. Ĝi estas tre utila, ĉar la lingvaĵo estas simpla: kiel eble plej malmulte da partecoj kaj mallongaj frazoj. Tial mi konsilas al ĉiu grupo: prenu abonon por la grupo, ĝi certe helpos perfektigi la novajn esperantistojn. La revuo estas ankaŭ utila kiel manlibro en perfekta kurso: tion ni intencas fari por la venonta kurso.”

H. RAINSON, Vic-prezidanto

Flandra Ligo Esperantista.

*Apeldorna Jurnalo*: Kio do estas la celo, kiun la plenaĝulaj esperantistoj volas atingi? Nenio pli aŭ malpli ol, ke Esperanto ekestu je la dispono de la junularo. Kaj kedu min la junularo faros dankeman uzon de tiu ĉi esprimilo. Kaj kiel agrable estos, ke la junularo de la tuta mondo nun povos reciproke interkonatiĝi. Sed ankaŭ por la komencantoj ĝi povas esti bonega helpilo por la lernado de Esperanto. Nun ĉiu povas havi en la kunveno dum la legado ion antaŭ si. Estas certe granda utilo, ke oni ne nur povas aŭdi Esperanton, sed ankaŭ povas vidi ĝin, presitan nigro sur blanko. Mi ne dubas pri la dezirindeco, ke ĉi tiu ĝojdona aperaĵo, „La Juna Vivo”, venu in la manoj de ĉiu komencanta esperantisto kaj ke ĝi estu preparolata kiel gvidilo.

J. L. SLAVENBURG, Apeldoorn.

2. La jenaj esperantistaj grupoj abonis la gazeton por ĉiuj aŭ preskaŭ ĉiuj anoj: Nederlando: Midden-Beemster, Broek in Waterland, Stompeteren, Stadskanaal, Alkmaar, West-Graafthijk, Wirdum (Fr.), Arcen (L.), Sliedrecht, Papendrecht, Dordrecht, Haarlem, Smilde, Wormerveer, Langereis, Schermerhorn, Purmerend, Wieringen.

Danujo: Erslev, Kalundborg.

Belgujo: Mechelen.

Svedujo: Amål, Råtorp.

Ĉeĥoslovakujo: Plzen.

Aŭstrujo: Zwettl.

Germanlando: Vlotho, Elberfeld.

Letlando: Alsungo.

Hispanujo: Valencia.

La jenaj infangrupoj abonis „La Juna Vivo”: de Rijp, Delft, Rotterdam, Haarlem, Marken-Binnen, West-Graafthijk.

Mi esperas, ke la gvidantoj de ĉi tiuj grupoj rakontu al ni, ĉu „La Juna Vivo” plaĉas kiel lernilo en la grupo.

3. Responde al la esperantistoj en Bulgarujo, Estlando kaj Ĉeĥoslovakujo: Ida Heermans permesis traduki „Fabelo pri laboro” kaj „Guus kaj la Luno” en ĉiujn lingvojn. Sendu du ekz. al ni, ni trasendos unu al la verkistino.

4. Responde al multaj: Kiel mi pagu mian kotizon? Iru al la poŝtoŝeĉejo kaj aĉetu eksterlandan poŝtmandaton. Interplenigu ĝin, pagu „unu guldenon” kaj vi estas preta. Nun mi esperas, ke ĉiuj baldaŭ pagu la abonmonon.

5. Oni povas aboni nur ekde 1 Julio.

6. Al multaj leteroj ni respondos en la sekvonta numero.